La kongreso komenciĝos oficiale la posttagmezon de la 14-a de januaro kaj finiĝos la posttagmezon de la 23-a januaro. Tamen, se vi deziras, vi povos alveni antaŭ la 14-a kaj resti post la 23-a.

Kiam vi intencas alveni kaj foriri?

.....

Helpo por transporto de la flughaveno

En kiu tago kaj en kiu flugo vi alvenos?

.....

Helpo por aliloka loĝado

Por kiuj datoj kaj por kiom da personoj vi bezonas loĝadon?

.....

Po-taga kotizo

En kiuj tagoj vi intencas ĉeesti?

.....

Tag-partoprenantoj

Ĉu vi elektas kotizon A, B aŭ C? .....

En kiuj tagoj vi intencas ĉeesti?

.....

Bv. sendi vian aliĝilon al: Oceania Kongreso 2008, Nov-Zelando Esperanto-Asocio, PO Box 8140, Auckland 1150, Nov-Zelando

Antaŭpagoj (se necesas)
Nov-Zelandanoj: bv. sendi vian ĉekon je la nomo de *Auckland Esperanto Society* kun via aliĝilo
Aŭstralianoj: bv. sendi vian ĉekon al *Australian Esperanto Association,* 57 Denham Street, Hawthorn, Victoria 3122 **aŭ** pagu rekte al Commonwealth Bank, BSB **063 138**, kontnumbro **1036 4559** (menciu vian nomon kun via pago kaj konfirmu al kasisto@esperanto.org.au).

OCEANIA KONGRESO EN AUCKLAND, NOV-ZELANDO

14-23 JANUARO 2008

Venu al Nov-Zelando por varma somera kongreso kaj kursaro kun internaciaj instruistoj

En januaro 2008, la Nov-Zelanda kaj Aŭstralia Esperanto-Asocioj okazigos kunan kongreson en Auckland, la plej granda urbo de Nov-Zelando. La urbo havas internacian flughavenon kun rektaj flugoj al/el ĉiuj mondpartoj.

La naŭ-taga kongreso ofertos kursojn je tri niveloj, kun internaciaj instruistoj: Trevor kaj Katja Steele el Aŭstralio, kaj Stano Marĉek, redaktoro de *Esperanto*.

La programo enhavos kursojn dum ok tagoj, prelegojn, distraĵojn, kaj tri ekskursojn. Pliaj detaloj pri la kongreso kaj la plena programo videblas sur nia retpaĝo.

Retpaĝo: www.esperanto.org.nz
Retadreso: nzea@esperanto.org.nz

La kongresejo estas Centro *St Francis Retreat* kiu troviĝas meze inter la internacia flughaveno kaj la urbcentro. La kongresejo havas unulitajn ĉambrojn (nur por unu persono). Se vi bezonas loĝejon por paro aŭ familio, ni povos aranĝi tion en hotelo proksime al la kongreso.

Ĉiuj ĉi-subaj kotizoj inkluzivas partoprenon en kursoj.

Tutkongresa kotizo inkluzivas loĝadon kaj tri manĝojn tage.
Se vi aliĝas antaŭ la:

1-a de oktobro 2007	NZ$770 (aŭ AU$680)
1-a de novembro 2007	NZ$795 (aŭ AU$705)
1-a de decembro 2007	NZ$820 (aŭ AU$730)

Bv. sendi vian antaŭpagon de NZ$100 (aŭ AU$90) kun via aliĝilo. La resto pageblas je la komenco de kongreso.

Po-taga kotizo de NZ$100 (aŭ AU$90) inkluzivas loĝadon kaj tri manĝojn tage. Antaŭpago de NZ$100 (aŭ AU$90) necesas.

Kotizoj por tag-partoprenantoj:

A. Ĉiuj manĝoj	NZ$60 (aŭ AU$53) tage
B. Tagmanĝo	NZ$40 (aŭ AU$36) tage
C. Sen manĝoj	NZ$25 (aŭ AU$22) tage

Antaŭpago ne necesas, sed bv. sendi vian aliĝilon

Ekskursoj:

Vizito al tipa renkontejo de la indiĝena maoria popolo (duontaga)	NZ$25 (aŭ AU$22)
Vizito al regiona parko kaj malnova kampara urbeto (tuttaga)	NZ$20 (aŭ AU$18)
Promeno en natura parko (duontaga)	NZ$15 (aŭ AU$13)

Antaŭpago ne necesas. Bv. pagi dum la kongreso.

Aliĝilo por Oceania Kongreso, Januaro 2008 Auckland, Nov-Zelando

Nomo:
Adreso:

Retadreso:

Mi volas partopreni en kursoj je la nivelo de:
Elementa Meza Progresinta
(bonvolu doni viajn 1-an kaj 2-an preferojn por lingvaj sesioj)

Mi elektas la jenan kotizon:

- ☐ tutkongresa kotizo
- ☐ po-taga kotizo
- ☐ kotizo por tag-partoprenanto

Mi intencas partopreni en:

- ☐ duontaga ekskurso al tipa maoria renkontejo
- ☐ tuttaga ekskurso al regiona parko
- ☐ duontaga ekskurso al natura parko

Mi bezonas:

- ☐ vegetaran manĝon
- ☐ helpon por aliloka loĝado (t.e. en hotelo apud la kongresejo)
- ☐ helpon por transporto de la flughaveno

Mi volas:

- ☐ kontribui al la programo, jene: .....